

DUMONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.

Oomoto

1
9
7
5

mar.-apr.

50-jara jubileo de Universala Homama Asocio

Eizo Ito

La 9an de junio de la kuranta jaro ni festos la 50-jaran jubileon de Universala Homama Asocio kaj memore tion ni havos plurajn gravajn eventojn, sed antaŭ ol informi pri ili mi permesas al mi iom priskribi pri la esencaj trajtoj de l' Asocio kaj rakonti pri kelkaj elstaraj aktivecoj faritaj dum la kvindek jaroj.

Oomoto kaj UHA

Sur la kovrila paĝo de ĉi tiu revuo oni legas la surskribon "Dumonata organo de Oomoto kaj U. H. A." Oni povus demandi, ĉu Oomoto kaj UHA estas unu sama afero, aŭ ĉu ili estas du tute apartaj aferoj? Por ambaŭ demandoj estas malfacile tuj respondi simple per Jes aŭ Ne. Ili estas identaj iusence, apartaj alisence.

Oomoto estiĝis en la jaro 1892 per revelacio al Nao Deguĉi, la Fondintino, kaj poste kompletigita kaj organizita de Onisaburo Deguĉi en formo de tiel nomata religio aŭ novspirita movado. UHA fondiĝis en la jaro 1925 laŭ la iniciato de O. Deguĉi, sed ne kiel religio, sed kiel kultura, porpaca movado, kun propra statuto. Do, UHA akceptas ĉiun kiel anon, nur se li aŭ ŝi aprobas la statuton kaj pagas sian membrokotizon, sendemande, ĉu oni kredas en iu religio aŭ ne. Fervoraj Kristanoj aŭ Budhanoj aŭ eĉ antireligiuloj, restante tiaj, povas membriĝi al UHA. Sed nature ĝis nun la plej

Oomoto

50-a jaro

n-ro mar.-apr.
(401), 1975

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio: OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561. *Poŝta ĝirkonto:* Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono: 1200 enoj aŭ 12,—ned. guldenoj, **Abonebla** ĉe niaj “Reprezentantoj” kaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002 Nederlando.

la bono de la homaro. En tiu senco oni ne povas, nek bezonas fari severan distingon inter Oomoto kaj UHA. Kaj tial, parolante pri la proporcio de la membroj de UHA, ni deziras, ke la nombro de la ne-oomotanoj membroj de UHA baldaŭ multe pli superu tiun de la membroj, kiuj jam estas oomotanoj.

UHA de la fondiĝo ĝis 1935

La unuaj linioj de la plej frua prospekto de UHA diras: “La Univesala Homama Asocio estas fondita kun la celo atingi fratigon kaj unuigon de la tuta homaro. Ĝi agados per amo kaj bono, kaj klopodos por realigo de ideala mondo, kie eterne ĉiuj estaĵoj povos ĝui feliĉon kaj ĝojon”.

Sekvas avertaj vortoj pri minacanta, terura sorto de la homaro, kiu perdis tian noblan idealon kaj estas submetita de egoismo kaj perfortismo. La prospekto fine akcentas forigon de l’ intermuroj starantaj inter rasoj, naciecoj, religioj k. t. p. kaj energian kunlaboron de bonvoluloj de la tuta mondo, super ĉiaj diferencoj, ne nur por eviti la teruran sorton, sed por plie konstrui la stabilan mondopacon.

UHA jam de l’ fondiĝo, adoptis Esperanton, kiel oficialan lingvon por sia internacia agado. Malnovaj esperantistoj eble ankoraŭ bone memoras

la grandformatan, sufiĉe belan monatan organon "Oomoto Internacia", eldonatan el Parizo, kie ni havis Eŭropan Centron, de 1925 ĝis 1933. S-ro K. Niŝimura, redaktoro kaj direktoro de la Eŭropa Centro, sukcese laboris dank' al la varmegaj kunlaboroj de multaj gesamideanoj de diversaj landoj. Li faris vojaĝojn tra Eŭropo, interkonatiĝis kun multaj gvidantoj de similaj, novspiritaj movadoj. "Blanka Standardo" de Viktor Schweitzer de Germanujo kaj "Blanka Fratara" de Petro Danov de Bulgarujo estis la ekzemploj, kiuj en tre frua tempo faris amikan, kunlaboran traktaton kun Oomoto kaj UHA. Al la alvoko pri konstruo de Domo de Homamo respondis amaso da kontribuaj brikoj, eĉ oferproponoj de tereno el diversaj landoj, kvankam bedaŭrinde la politika klimato baldaŭ tre malfavoriĝis tiel ke la Eŭropa Centro estis devigita sin fermi kaj la plano de Domo de Homamo ankaŭ ne plu povis progresi.

En la Oriento, la UHA-movado faris aparte mirindajn paŝojn, krom en Japanujo, en Koreujo, Manĉurio (la nordorienta regiono de Ĉinio), Mongolujo, Tailando k. a., En tiuj landoj ĉ. dek religioj aŭ novspiritaj movadoj sinsekve manpremis kun UHA; multege da Ĉinoj kaj Koreoj membriĝis kaj portis surbruste la insignon de UHA. Fondiĝis pli ol mil ducent filioj en la mondo, el kiuj la duono estis ekster Japanujo. Tie en la Orientaj landoj la japana lingvo estis pli-malpli komprenata kaj cetere, la nombro de Esperantistoj ankoraŭ estis malgranda, kaj tial ni ne povis praktike utiligi nian lingvon. Sed ni kaptis ĉiun okazon por disvastigi ĝin, okazigante la kursojn de Esperanto en diversaj urboj Ĉinaj kaj Koreaj.

UHA trovis favoran akcepton ankaŭ en Brazilo pere de enmigrintaj japanoj ĝis fine oni sukcesis fondi Brazilan Centron. Dank' al la mirinda gvidado de Prezidanto Onisaburo Deguĉi, kaj dank' al la pionira agado de Vicprezidanto Hidemaru Deguĉi precipe en niaj najbaraj landoj, la UHA-movado rapide prosperis. Ĝi tamen ankoraŭ ne estis sufiĉe forta por mildigi la internacian tension, kiu pli kaj pli intensiĝis mondoskale, kaj ĝi estis interrompita per la senprecedenca persekuto fare de japana registaro, en 1935.

Sekve de tio Onisaburo Deguĉi, lia edzino, bofiloj kaj miloj da disĉiploj estis arestitaj kaj multaj el ili malliberigitaj. Daŭris nigre mallumaj dek jaroj por ni; intertempe okazis la Dua Mondomilito kaj finiĝis.

UHA refondita postmilito

Fine de la jaro 1945 Oomoto deklaris sin refondita, kaj post kvar jaroj ankaŭ UHA. La reorganizita UHA direktis sian plej grandan forton al progresigo de la movado por mon dofederalismo. Ĝi subtenis la okazigon

ne nur de la Azia Konferenco de Mondofederalistoj (dufoje) en Japanujo, sed ankaŭ de la Mondokongreso de Mondofederalistoj en Tokio, kaj invitis iliajn postkonferencojn al Kameoka.

La urbo Ajabe, kie estas la Centra Templo de Oomoto, oficiale deklaris en 1950 sian aprobon pri la starigo de mondofederacio. La samon faris en 1952 la urbo Kameoka, kie sidas la Centro de UHA. Tiujn ekzemplojn sekvis, plejparte laŭ la klopodoj de UHA, multaj urboj, urbegoj kaj gubernioj unu post alia en la daŭro de 25 jaroj tra tuta Japanujo ĝis fine la tuta nombro de la lokaj aŭtonomaj komunumoj, deklarintaj sin subteni la Mondofederalismon, atingis pli ol 300, inkluzive la urbegojn, kiel Tokio, Oosaka, Kioto, Okajama, Hiroŝima k. t. p.

Okaze de la tragedio kaŭzita de la unua eksperimento de H-bombo en Bikini-insularo en 1954, UHA decidis fari grandskalan kampanjon por kolekti subskribojn kontraŭ A- kaj H-bomboj. Ĝi ne bezonis longan tempon por akiri du milionojn da subskriboj. Multaj porpacaj organizoj ekstaris kaj baldaŭ la nombro de la kolektitaj subskriboj atingis 30,000,000 nur en Japanujo, kaj 700,000,000 en la tuta mondo. Ĉiujare okazis viglega kongreso kontraŭ A- kaj H-bomboj en Japanujo kun grandnombra partoprenantaro, inkluzive la delegitojn senditajn de multaj landoj kaj diversaj organizoj. La japana parlamento plurfoje deklaris proteston kaj forte rekomendis la neniigon de nukleaj armiloj.

Sed baldaŭ interne de la tendaro de la movado kontraŭ H- kaj A-bomboj aperis intensaj konfliktoj pro malsamaj politikaj ideologioj kaj starpunktoj. Malpaco en la pacmovado! UHA, post kiam ĝi faris ĉiujn eblajn klopodojn por repacigo, fine estis devigita sin retiri el tiu bedaŭrinda tumulto, en 1962. Rapide pasis naŭ jaroj, dum kiuj la agado de UHA estis relative nevigla, krom por la movado por Mondofederalismo, por kiu Isao Deguĉi, la tiama ĉefdirektoro de UHA, neniam perdis entuziasmon kaj ĉiam aktive laboris.

UHA reorganizita por pli aktiva agado

En januaro de 1971, Naohi Deguĉi, la Honorprezidantino de UHA, sugestis la revigligon de UHA-agado kontraŭ tiom multaj teruraj problemoj, kiuj minacas la ekzistadon mem de la homaro, nome detruigo de la naturo, veneniĝo de la akvo, tero kaj aero, superkresko de la loĝantaro, manko de nutraĵoj kaj materialoj, proliferado de nukleaj armiloj k. t. p.

Oni renovigis la statuton de UHA, pli fortigis la sistemon de la centra oficejo, fondis diversajn komitatojn kaj fakojn, nomumis multe da direktoroj kaj konsilantoj, rekomencis eldonon de ĵurnalformata, sespaĝa organo

ĉiumonata japanlingva, restarigis lokajn organizojn tiel ke en ĉiu gubernio fondiĝu gubernia centro kaj sub ĝi pluraj filioj. Oni decidis la fundamentan principaron el sep paragrafoj.

1. Ni agnoskas ke la mondo estas unu kaj la homaro estas frataro.
2. Ni forneas militon kaj ĉian perforton.
3. Ni neniigas socian malbonon de egoismo kaj maljusteco.
4. Ni respektas la homan dignon kaj vivas kun ĝojo en laboro.
5. Ni amas la naturon kaj respektas la sanon kaj vivon de ĉiuj estaĵoj.
6. Ni respektas la propran kulturon de ĉiu nacio, dum ni klopodas por la internacia interkompreniĝo kaj amikeco.
7. Ni celas realigon de stabila mondopaco laŭ la devizoj de universala homamo kaj samorigineco de ĉiuj religioj.

Laŭ ĉi tiu fundamenta principaro ni starigis pli detalan agrogramon por ĉiu paragrafo.

Por la 1a paragrafo :

- a, Disvastigo de la ideo de universala homamo tra la mondo.
- b, Klopodo por forigi ĉiaspecan diskriminacion.

Por la 2a :

- a, Disvastigo de la spirito de la Japana Konstitucio al ĉiuj nacioj kaj klopodo por kreado de mondoklimato, kiu ebligas totalan malarmadon.
- b, Progresigo de la mondoglobala movado.
- c, Kreo de socio, kie regas reciproka fido kaj nenia perforto.

Por la 3a :

- a, Forigo de egoismo kaj akcelo de simpatio kaj ĝentileco.
- b, Respekto de moralo kaj etiko.

Por la 4a :

- a, Restarigo de la homo laŭ la originala spiriteco.
- b, Laboro diligenta kaj vivo artisma.
- c, Altigo de servemo por la socio kaj progresigo de sociala bonfara sistemo.

Por la 5a :

- a, Protekto de kaj intimiĝo al la Naturo.
- b, Disvastigo de "Homama agrikultura metodo", kiu garantias la sanon kaj pli abundan rikolton.
- c, Disvastigo de saniga dieto.

Por la 6a :

- a, Respekto de tradicia nacia kulturo kaj amo al sia lando aŭ regiono.
- b, Amo kaj respekto de nacilingvo.
- c, Disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Por la 7a :

- a, Progresigo de interreligia kunlaboro kaj toleremo.
- b, Kunlaboro kun diversaj samcelaj movadoj.

Antaŭ tri jaroj ni fondis "Homaman Fonduson", laŭ la iniciato de nia Honorprezidantino. Ĝi ricevas kontribuojn de la UHA-anoj, kiuj ĉiutage ŝparas aŭ unu tason da rizo aŭ uzon de taksio aŭ monerojn restantajn en la poŝo, por helpi al malsataj popoloj de Afriko kaj Azio. Januare de la pasinta jaro ni sendis du delegitojn al Malilando por transdoni ofermonon el la Fonduso. Ankaŭ al Vjetnamio ni sendis delegitojn kaj donacis traktorojn por iomete helpi tiean agrikulturon, pere de la Centro de Kaodaiismo, kun kiu ni estas jam longe en amika rilato. Aparte ni sendis Akihiro Deguĉi, direktoro kaj eksperto de nia agrikultura fako, al Ĉinio kaj Vjetnamio, laŭ ilia invito, por informi pri nia nova metodo. En aprilo E. Itoo, kiel ano de Japana esp-ista delegacio vizitis Ĉinion, laŭ la invito de Ĉina Esp.-Ligo kaj en aŭgusto li partoprenis la Duan Mondokonferencon pri Religio kaj Paco okazinta en Belgujo, kie li faris tri proponojn: pri Esperanto, Senvianda nutrado kaj mondocivitana registrado.

Nun iom pri evento, kiun ni baldaŭ havos okaze de la 50-jara jubileo de UHA.

La 7an kaj 8an de Junio okazos en Kameoka "La Sepa Konferenco de Religiistoj por Paco per Mondofederacio". Kiel la titolo indikas, ni jam havis ses konferencojn, ĉiufoje en la sidejo de gravaj religiaj organizoj Budhisma, Ŝintoisma aŭ Kristana. Naohi Deguĉi, Honorprezidantino de UHA estos la Prezidantino de la venonta Konferenco ĉe Kameoka kaj ĝia Honora Patrona Komitato konsistos el eminentaj gvidantoj de gravaj religiaj organizoj, krom D-ro H. Jukaŭa, nobelpremiito kaj T. Katajama, iama ĉefministro. La Sepa Konferenco okazos sub la organizado de UHA en kunlaboro kun diversaj religiaj organizoj kaj aliaj.

Arteskpozicio de Onisaburo kaj lia Skolo en Usono, Kanado

Brockton Art Center

Oak Street on Upper Poster's Pond, Brockton, Mass. 02401

1 maj. ~ 15 jun.

Chautauqua Institution

Chautauqua, N. Y. 14722 **4 aŭg. ~ 24 aŭg.**

The Art Gallery of Greater Victoria

1040 Moss Street, Victoria, B. C. V8V 4P1, CANADA

30 sept. ~ 26 okt.

Oomoto

Mondofederacio antaŭ la 21a jarcento!

La ĉi-supra titolo estas la devizo adoptita por la (venonta) 7a Konferenco de Religiistoj por Paco per Mondofederacio. Iu budhista episkopo plendis ke tio estas tro malrapidema, ĉar ĝis la 21a j. c. ankoraŭ estas dudek kvin jaroj, dum kiuj nenio garantias ke ne okazos fatala katastrofo por la homaro, nek estas nula la ebleco ke ni atingos la celon eĉ en kvin aŭ dek jaroj, nur se ni koncentros ĉiujn niajn fortojn. Alia, profesoro de antropologio, aprobis ĝin, dirante, ke ĝi montras bonan limtempon, kvankam oni bezonos fari energian penadon por ĝin efektiviĝi ĝustatempe.

Ni membroj de UHA kredas ke tiu dezido estas donita el la ĉielo! Tiel bonvena kaj konvena laŭ diversaj vidpunktoj. Ni faros nian plejblon intertempe. Se feliĉe la cirkonstancoj favoros nin por efektiviĝi mondofederacion en kvin aŭ dek jaroj, tiam ni nur danku la providencon. Sed oni devas sin

gardi de troa optimismo kaj senpacienco. Eĉ dudek kvin jaroj tute ne estus sufiĉa tempo, se oni konsiderus la grandajn dimensiojn de l' afero. Kaj tamen mondofederacio ne plu estas ia bela revo: ĝi ja estas aktuala problemo inter la realaj faktoj. Ni devas nepre ĝin meti en la tagordon de ĉia konferenco okazigata por la bono de la homaro. La konsiderado eviti totalan detruigon devas havi prioritaton super iu ajn alia grava afero. Cetere mondofederacio ne estas simple nur negativa defendilo kontraŭ totala aŭ parta pereigo, sed ĝi estas bazo, sur kiu devas esti fondita la tuthomara regno de feliĉo, evoluonta por eterne.

Laŭ sugesto de D-ro H. Jukaŭa, ni komunikos la rezultojn de nia konferenco al la 25a Simpozio de Pugwash-Konferenco^{*)}, okazonta en aŭgusto en Kioto kun partopreno de kvindek elstaraj fizikistoj de la mondo, plejparte nobelpremiitaj, kiuj disku-

*) En 1955, Bertrand Russel kaj Albert Einstein kune faris deklaron, per kiu ili admonis la potencojn de la mondo ke ili solvu internaciajn disputojn per pacaj rimedoj anstataŭ nukleaj armoj, ĉar per ĉi tiuj neniuj el ili povas atingi sian celon, sed minacas la ekziston mem de la homaro. Al tiu Rusel-Ejnstejna Deklaro reagis konsciencaj fizikistoj el ambaŭ flankoj de la "ferkurteno", kaj en 1957 havis sian unuan konferencon en Pugwash, Kanado, kie ili diskutis, kiel realigi la spiriton de la Deklaro. De tiam ili havis 24 konferencojn en diversaj urboj de la mondo (kun la lasta en Vieno, 1974 kaj la venonta en Kioto, ĉi-jare), ĉiam sub la nomo "Pugwash-Konferenco", kaj kontribuas al la levado de publika opinio kontraŭ la konstanta minaco de atoma milito kaj por la totala malarmado de la mondo. — Noto de la Red.

tos pri rimedoj por kompleta malar-
mado de la mondo. D-ro Tojoda,
sekretario de tiu Simpozio, faros en
nia konferenco specialan prelegon
pri Pugwash-Konferenco. Tiamanie-
re la porpacaj konferencoj de religi-
istoj kaj de sciencistoj estos kunligi-
taj per ia tubo kaj tio estos tre
signifa por ambaŭ konferencoj.

Antaŭvideblas ke la 7a Konfe-
rencon de Religiistoj en Kameoka
partoprenos ĉ. mil reprezentantoj de
diversaj religiaj organizoj. Ni dezi-
ras ke la konferenco alportos kon-
kretajn agoprogramojn por atingi la
celon nepre en la venonta kvaron-
jarcento.

Alia evento okazonta tuj post la
menciita konferenco estas la Unua
Mondokongreso de Mondocivitanoj,
kiu havos lokon en San Francisko,
nome en tiea Ŝtata Universitato, je
20~25 julio, kaj kiun partoprenos
kelkdekoj da UHA-anoj kune kun
aliaj kelkdekoj da japanaj mondo-
civitanoj.

Pri mondocivitana registrado ni
jam de longe havas intereson : antaŭ
dek kvin jaroj, ni registriĝis laŭgrupe
de nia Esperanta sekcio. Sed en la
pasinta jaro UHA decidis fari ener-
gian kampanjon de registrado laŭ la
formulo de Monda Asocio por
Mondoferacio (WAWF). Ĝis nun ni
sukcesis kolekti 100,000 individuajn
subskribojn por la registriĝo. Kom-
preneble la cifero kreskas ĉiutage
dank' al la agado de niaj lokaj
organizoj kaj individuaj membroj.

La menciita Kongreso de Mondo-
civitanoj estas planita memore je la

tridek-jara datoreveno de la fondiĝo
de la Unuiĝintaj Nacioj, ĝuste en la
loko, kie oni deklaris ĝian fondiĝon
siatempe. Tamen, la celo de tiu
konferenco ne estas simple gratuli la
ekzistadon de UNO, nek honori ĝiajn
meritojn, certe tre grandajn ; sed ja
plifortigi kaj evoluigi ĝin laŭ la
esenca spirito de ĝia fondiĝo. Rilate
la sekurecon de la homara ekzistado
ni ja sentas intensan maltrankvilon
je UNO, kiu ofte montriĝas inter-
batalejo de naciaj egoismoj, kiel
plendis U. Thant, ekssekretario ĝe-
nerala mem. Disvastigi la ideon de
mondcivilitaneco inter la homaro
certe estas baza rimedo forigi aŭ
almenaŭ mildigi la naciegoismon
kaj tiel ebligi la integran agadon
de UNO. Samtempe ni devas elpensi
plibonigojn de la sistemo de UNO,
kiuj malebligos la naciegoismon sin
trudi en la komunajn interesojn de
la homaro, eĉ se ĝi ne estos komple-
te bridita. En San Francisko oni
diskutos interalie pri projekto de
amendo de la Ĉarto, prezentota al la
proksima ĝenerala asembleo de UNO.

Rilate ĉi tion ni citu la vortojn de
Edmond Privat, pioniro ne nur de
Esperanto, sed ankaŭ de la Mondo-
federalismo, el lia artikolo "Federa-
lismo" : ". Unua progreso estus
havi krom la nunan ĝeneralan kun-
venon de la registaroj duan ĉambron
de la popoloj, al kiu la delegitoj
estus rekte elektataj de la popoloj
mem. Dua progreso estus anstataŭ-
igi la nunan konsilantaron de seku-
reco per vera estraro de *personoj*,
elektotaj de la du ĉambroj kune kaj

Historia Signifo de

la Artekspozicio de Onisaburo

D-ro Frederick Franck

Estimataj gesinjoroj

Antaŭ ĉio, permesu al mi esprimi mian dankon, ke mi ĉeestas ĉi tie kun vi, kaj esprimi mian bedaŭron, ke mi ne povas esprimi min per via lingvo. Ĉi tiu estas mia 4a vizito al via lando, aŭ mi diru — al *nia* lando. Ĉar depost mia unua alveno ĉi-landen, mi ĉiam sentis min tiel hejme, ke mi sincere sentas ke iam, eble en antaŭa enkarniĝo, mi devis esti Japano, malgraŭ mia longa nazo. La problemo estas solvebla per tiu supozo, ke antaŭ mil jaroj, kiam mi estis Japano, mi devis esti surdmutulo, kaj tio klarigus, kial en la nuna enkarniĝo, mi ankoraŭ estas kiel bebo, kiu ankoraŭ ne lernis paroli.

Tial, bonvolu ne demandi min, ĉu mi ŝatas tiun ĉi landon, ĉar mi ne ŝatas. Mi amas ĝin! Kaj surdmutulo povas esti akre sentema al la koroj de aliaj homoj, kaj eble mi flatas min, sed mi sentas al mi intima la koron de Japanujo. Jen kio kondukis min al Oomoto kaj kiel mi konatiĝis kun ĝi.

Pasintjare, kiam mi estis en Londono, mi hazarde havis la okazon vidi la artekspozicion de Onisaburo ĉe la fama Viktoria kaj Alberta Muzeo. Mi trovis ĝin belega, kaj frapis min, ke tiu ĉi Onisaburo, kiun ĝis tiam mi tute ne konis, estas ne nur granda artisto, sed religia artisto, kvankam li uzis neniajn religiajn simbolojn aŭ figurojn en sia verko.

Mi estis profunde impresita. Kaj jen kelkajn monatojn poste, mi ricevis leteron de Japana amiko, Prof. Masatoŝi Doi (emerita profesoro de Universitato Dōŝiŝa en Kioto); tute ne sciante ke mi vidis tiun ĉi ekspozicion, li demandis min per tiu letero, ĉu mi ne povus helpi al la aranĝo de bela Japana ekspozicio, migronta en Usono.

respondecaj al ili. Tiuj personoj ne reprezentus apartajn registarojn, sed la tutan homaron. Ili ne rajtus enmiksiĝi en la internan politikon de la nacioj, sed nur konservi la pacon kaj zorgi pri komunaj, ne apartaj interesoj.”

Ni informiĝis ke la Kongreso en San Francisko bonvenigos Esperant-

istojn kaj ankaŭ parolojn en Esperanto. Tute prave, ĉar la Esperantistoj jam per si mem estas la plej efektivaj mondocivitanoj. Mi esperas ke precipe la Usonaj gesamideanoj bonvolos kunlabori por brila sukceso de ĉi tiu historia evento.

(E. I.)

Homa destino estas mistera. Mi konis la ekspozicion kaj amis ĝin, kaj kvankam mi ne kutimas okupi min pri okazigo de iu ajn alia artekspozicio, ol mia propra, mi ekagis. Mi havis inspiron. Anstataŭ pensi pri kontaktiĝo kun muzeoj, mi kontaktiĝis kun la *Cathedral Church of St. John the Divine*, la ĉeftemplo, oni povus diri, de la Episkopa Preĝejo en Usono kaj la plej klasika kaj la plej granda Katedralo iam konstruita en Nord-Ameriko. Mi sciis, ke la Katedralo estas precipe aktiva en kulturaj aferoj, per siaj klopodoj superponti la fendon inter arto kaj religio. Tre belaj ekspozicioj kaj prezentadoj de dramo, danco kaj muziko enhejmiĝis tie. Mi sukcesis aranĝi por la ekspozicio de Onisaburo, ke ĝi estu akceptita kun entuziasmo.



D-ro F. Franck

Nu, estimataj gesinjoroj, bonvolu bone kompreni, kion tio signifas: Kristana Katedralo estas preta montri la Religian arton de ne-Kristana Religio kaj tiele honoras ĝin kaj ĝian kunfondinton kiel grandan artiston. Tio estus komparebla nur kun Niŝi-Honganĵi, la ĉeftemplo de Pur-Landa Budhismo en Japanujo, prezentanta ekspozicion de Protestanta aŭ Katolika arto, kio estas preskaŭ neimagebla.

Kiam mi legis literaturaĵojn pri Oomoto, por familiarigi min kun ĝia kredo kaj ĝia historio, multaj punktoj estis neklaraj al mi, kaj pensis, ke se ili estas tiel neklaraj por mi, kiu havas profundan intereson en arto kaj religio, kiom pli neklaraj ili estus por la meza Usonano aŭ por iu ajn okcidentano.

Mi diskutis pri ĉi tio kun Kiotaro Deguĉi kaj Joŝimi Umeda en Nov-Jorko, kaj el ĉi tiu diskutado rezultis, ke mi hodiaŭ troviĝas tie ĉi kun vi, ĉar mi intencas prepari modestan libron por Okcidentaj legantoj, kiu prezentos al ili la historion kaj la doktrinon kaj la ritojn de Oomoto en formo facile komprenebla por ili — formo, kiu interesos la okcidentan leganton.

De kiam mi venis tien ĉi kaj vizitis Kameoka kaj Ajabe, mi ne nur ĝuis la plej delikatan gastamon de Oomoto, sed ankaŭ estis profunde impresita de arkitekturaj esprimoj de via religio en Banŝō-den, Miroku-den, aŭ ĉe Curujama kaj Tennōdaira.

Oomoto estas rigardata kiel unu el la tielnomataj Novaj Religioj. Kaj

la arkitekturo, per kiu la Novaj Religioj esprimas sin, ŝajnas celanta imponi eksterulojn kaj internulojn per sia potenco kaj riĉo. La arkitekturo de Oomoto kontraŭe havas nenian signon de la vana montrado: ĝi estas ideale kaj modele kaj klasike, en la plej bona senco, Japana. Ĝi estas sen bildoj, ornamaĵoj, superstiĉaj objektoj kaj idoloj. Ĝi elspiras profunde kontemplan, ĝojan, kaj tamen, seriozan spiriton. Ĝi simbolas noblan mensostaton kaj purecon de spirito, kiu estigas respekton.

Mi ne povas ĉi tie komenci paroli al vi, kiel grava estas la ideo — la inspiro, kiun s-ro Kiotaro ricevintus rekte el la ĉielo: rondirigi la Ekspozicion de Onisaburo. Sed ĉi tiu ekspozicio pruvas, ke homo persekutita kiel nacia malamiko N-ro 1 ja produktis arton, kiu certe estos unu tagon klasigita kiel nacia trezoro N-ro 1. Tio ĉi estas grava. Sed eĉ pli grava estas tio, ke Oomoto nun uzas siajn art-trezorojn tra la mondo kiel spiritan mesaĝon. Ĝi prezentas ankaŭ Noon, Ĉanojn kaj Ŝimajon kiel esprimojn de religia priokupo, ne kiel nurajn estetikajn ludojn. Sekve, ĝi nun plenumas propagandon sur la plej alta nivelo por via Japana prestiĝo ne kiel mortinta afero de la pasinteco, sed kiel vivanta forto de la nuneco.

La respondajn eĥojn kiujn kaŭzis ĉi tiu klopodo en la okcidento, oni devas aŭdi ĉi tie. Mi celas diri: via registaro devas rekoni ĝin, devas danke

FREDERICK FRANCK

artisto, dentisto kaj verkisto, naskiĝis en Maastricht, Nederlando, 12. apr. 1909; studis en Amsterdamo, Antverpeno kaj Edinburgo; venis al Usono en 1939, finis la Universitaton Pittsburgh en 1942 kaj ŝtataniĝis en 1945; doktoro pri denta medicino, pri denta kirurgio, pri beletro, honordoktoro pri belartoj. Se ne detali lian dentistan praktikon, menciindas almenaŭ, ke li volontule kunlaboris ĉe Hospitalo Albert Schweitzer en Lambarene, 1958 ~ 1960. Lia ekspozicio (de desegnoj, krokizoj, pentraĵoj) okazis ĉe multaj galerioj ne nur en Usono, sed ankaŭ eksterlande: en Parizo, Amsterdamo, Genevo, Londono, Roterdamo, Bruselo, Romo, Tokio, Kioto, Melburno; ricevis multajn premiojn kaj liaj verkoj estas reprezentataj en "ĉiamaj kolektoj" de deko da renomaj muzeoj.

VERKOJ: Open Wide, Please (1957), Aŭ Pays du Soleil (1958), Days with Albert Schweitzer, a Lambarene Landscape (1961), My Eye is in Love (1963), Au Fil de L'Eau (1964), Outsider in Vatican (1965), Met Het Oog Op Het Vatican (1965), I Love Life (1967), Exploding Church (1968), Open Book (1967), Croquis Parisien (1969), Tutte le Strade portano a Roma (1969), Le Paris de Simeon (1969), Simeon's Paris (1970), The Warwick Paly of Everyman (1970-73), Tussen Broek en Brooklyn (1971), The Zen of Seeing (1973), Pilgrimage to Now/Here (1973).

Li konstruis "neŭtrale-homan" templon *Pacem in Terris* (Paco sur la Tero) en Warwick, Nov-Jorko, en 1965. (Resumita laŭ "Who's Who in America" 1974-1975)

La vojo de Onisaburo estas jam malfermita al la mondo !

Mesaĝo al miaj Oomotanaĵ amikoj

de Vadime Elisseeff,

Kuratoro de Muzeo Cernuschi

Je la antaŭvespero de la lasta montrado de la "Arto de Onisaburo kaj lia skolo" en Eŭropo, mi profitas tiun ĉi okazon por substreki mian kontenton pri la rezultoj, kiujn ni atingis per la ekspozicio. Kion ni komencis montri, nome la veran valoron de la arto de Onisaburo, en 1972 ĉe Muzeo Cernuschi en Parizo, tio estis sinsekve subtenata de miaj kolegoj en Bezanco, Marsejlo, Nico kaj Kaeno, kie la ekspozicio ĉiam ĝuis grandan komprenon. Poste, en Londono, Roterdamo kaj nun en Gento, la esenca spirito de la ekspozicio estis varme akceptata de la homoj de bonvolo.



Estis vere mia privilegio ke mi povis unuafoje prezenti la personecon de Onisaburo en la Okcidento. Mia sincera deziro estis montri plibonan komprenon pri Arto, ĉar la vivo de Onisaburo povas esti rigardata kiel ekzemplo de la kultura teniĝo, kiu, senrigarde al ĉia diferenco de socia kaj

agnoski ĝin kaj devas fari, ke la eĥoj el *London Times*, *Le Monde*, *The New York Times* (se menciis nur la plej grandajn ĵurnalojn de la mondo) dissonadu tra tuta Japanujo.

Ĉar kion Oomoto faras, tio estas montri, ke la nuntempa Japanujo havas pli, por prezenti al la mondo, ol eĉ la plej precizajn elektronikajn aparatojn, tranzistorojn kaj magnetofonojn. Se tion oni ne kuraĝigas kaj rekomendas kiel modelan ekzemplon, ĉi tiu lando ankaŭ estas lando de la blinduloj.

Mi ne parolos detale pri la rivelaj konversacioj, kiujn mi havis pri la aferoj de kredo, etiko kaj historio de Oomoto. Mi nur volas diri al vi, ke

politika pozicioj, serĉas la veran vivon, feliĉon kaj plenan ĝojon ene de niaj ĉiutagaj aktivecoj. Mi estas certa, ke ĉiuj, kiuj vizitis la ekspozicion komprenis kio estas tiu kultura potencialo kaj kredo en la vivo, kiu estas intime ligita al ĉiu situacio. Ni sentas nin postulataj, ke ni plibonigu nian kulturan kaj spiritan partoprenadon en la mondo, komunan al ĉiuj homoj de bonvolo.

Arto estas ligita kun profunda kunsento, komuna al la homaro por disetendi la fratecon, kaj en tiu rilato la universala valoro de la mesaĝo de Onisaburo alte levigas por plivaste kontribui al la pliriĉigo de niaj kulturaj spertoj, kvazaŭ oni malfermus ventumilon por formi plivastajn eblecojn al ni. Estas nia devo devote strebi al pli bona, pli feliĉa vivo! Nia ekspozicio, mi ne dubas, malfermis la okulojn de homoj por tiu ĉi celo.

Se en la estonteco iuj diskutos pri tio kion mi faris kun tiu ĉi ekspozicio, neniuj tamen parolos ion kontraŭ la valoro de la Jōūan. Ne nur la Jōūan, sed ankaŭ ĉiu artaĵo ekspoziciita montris al ĉiuj, kiel apreci kaj praktiki la esencon de Onisaburo kaj Oomoto, animitan per enormaj kvantoj da energio kaj sincereco.

Estis honoro por mia edzino kaj mi mem, ke ni havis la ŝancon vidi, kion vi faradas en praktikaj manieroj, foje ne sen faktaj malfaciloj, ne nur en Kameoka kaj Ajabe, sed ankaŭ en la daŭro de la ekspozicio en Eŭropo. Mi kredas ke ankaŭ en Nord-Ameriko oni bone komprenos la veran signifon, pri kiu la ekspozicio rakontas al ni. La vojo de Onisaburo, por kiu vi strebadis dum multaj jaroj, certe triumfos per viaj internaciaj agadoj.


Mi dankas al Sinjorino Naohi Deguĉi, kiu volonte permesis al mi organizi la ekspozicion, kaj al ĉiuj amikoj de Oomoto, kiuj montris al ni larĝanimecon kaj kunlaboremon en ĉiu situacio. Mia devo estis malfermi unuan eblecon, kaj tial, mi restos kun vi tiel longe dum ni povos helpi unu la alian. (La 28-an de novembro 1974)

Elfrancigis Joŝimi Umeda (en Gento)

tiuj konversacioj kun s-ro Kiotaro Deguĉi, kun s-ro Torao Deguĉi, kun tiu klera mirinda persono Teruo Nakamura klarigis kaj konfirmis kion mia legado kaj mia intuicio jam rakontis al mi pri Oomoto. Mi estas certa, ke tiuj konversacioj treege helpas min kiam mi skribos verkon pri Oomoto kun io pli ol nura intelekta kompreno; ne kiel malvarma observanto de ekstere, mi portretos Oomoton per la lensoj de la koro.


(Parolado, farita antaŭ la pli ol trimil Oomotanoj kolektiĝintaj por Secubunfesto en Miroku-den, Ajabe, la 3an de Aprilo 1975.)


Elangligis T. Nakamura.



Cathedral Church of the Saint John the Divine, Amsterdam Avenue, Nov-Jorko, kie la Artekspozicio de Onisaburo kaj lia Skolo okazis de 14 marto ĝis 18 aprilo, 1975

La malferma Diservo plenumata laŭ la ritoj de Oomoto en la Katedralo





**La ludado de dukordaj Jakumo-kotooj,
akompananta la Diservon**

**Dekano James Morton, Kanoniko Edward West kaj
Kiotaro Deguĉi (vestita en kamiŝimo) en la ekspozicejo**






**Interkonatiga Kunveno en subtera halo de la Katedralo,
kun partopreno de kelkaj esperantistoj novjorkaj**

**Tre multaj vizitantoj aprecis la artaĵojn
de Oomoto ĉiutage**





**D-ro F. Franck klariganta pri la tradiciaj artoj
de Japanujo al kunvenantoj**

**La verko de d-ro F. Franck, *An Encounter with Oomoto "The Great Origin"*
juz eldonita de Cross Currents, N. Y.**



Zilengo

Doktoro A. Oka e Zilengo, unik lengo internacial, ko la inventas du ano anteor a la venas savir Esperanto. (Doktoro A. Oka kaj Zilengo, unika lingvo internacia, kiun li elpensis du jarojn pli frue ol li konatigis kun Esp-o.)

Zilengo estas sendube la sola planlingvo iam kreita de japano surbaze de latinidaj lingvoj. Ĝi estis ellaborita de D-ro Asajiro Oka en 1887, nome ĝuste en la jaro de la naskiĝo de Esperanto, sed li mem tute ne sciis tiam pri la ekzisto de tiu lingvo. Sed detalaj informoj pri Zilengo kaj ĝia kreinto mankas eĉ al la plej eminentaj interlingvistoj kaj historiistoj, tiel ke la fama Historio de la Mondolingvo de E. Drezen donas, sur la paĝo 212, nur jenajn liniojn :

Nur laŭ nomo de aŭtoro d-ro Oka, profesoro de Tokia Alta normala lernejo kaj fama biologo, estis donita al ni informo pri manuskripta projekto, nenie publikigita — la sola projekto ellaborita en Japanio.

En aŭgusta N-o de japan-esperanta gazeto “La Revuo Orienta”, j. 1931 ni trovis kelkajn detalojn pri tiu projekto, nomata Zilengo, kiu estis ellaborita sur bazo de eŭropaj lingvoj kaj iom similis al Esperanto. Dum la tempo de sia projektado (ĉirkaŭ la 1890) d-ro Oka konis volapük-on, sed ne sciis ankoraŭ pri apero de Esperanto.

La “kelkaj detaloj” aperintaj en la Revuo Orienta estas japanlingva artikoleto de Susumu Aihara, en kiu la aŭtoro prezentas al la leganto la du eminentajn japanajn esperanto-pionirojn, kiuj pli-malpli konis Volapük. Jen ĝia parta traduko :

En Zilengo, la substantivo kaj la pronomoj finiĝas per vokaloj; la adjektivo per *d, k, l*; la adverbo per *m, n, p*, kaj la verbo per *r, s, t*. “Doner le pano” egalas al “Donu al li panon”, kaj “Za ve donos libro” signifas “Mi al vi donos libron”. La reguloj pri la finaĵoj iom diferencas de tiuj de Esp-o, sed pliparto da vortoj tiel similas al tiuj de Esp-o, kiel unu ovo al alia.

Fakte restas malmulta materialo por konatigi kun Zilengo. Eĉ nenia kajero de la kreinto pri la lingvo restas nun, kaj kiam li jam pasis for, oni

povas al neniŭ sinturni por nova eltrovo. La supre prezentita artikoleto de Aihara estas, en efektiveco, simpla maldetalo, el kiu neniŭ povas eĉ imagi la unikan superecon de la lingvo Zilengo, kompare kun la aliaj projektoj planlingvaj, senparole jam pri la karakteriza ideo de d-ro Oka, kiel devas esti laŭ li la ideala lingvo internacia.

Mi povis disponi probable preskaŭ ĉiujn el la restantaj materialoj, el kiuj aparte valoraj estas la jenaj tri artikoloj, ĉiuj aperintaj siatempe en La Revuo Orienta (R. O.) :

1. D-ro A. Oka : Skizo de la lingvo internacia "Zilengo", R. O., n-ro 12, 1936.

2. Intervjuo farita de la Redakcio kaj publikigita japanlingve, okaze de la 50-jara datreveno de la apero de Zilengo, R. O., n-ro 4, 1940.

3. D-ro A. Oka : Ante Kinkdek Anoj (en Zilengo kun paralela traduko esperanta far la aŭtoro mem : Antaŭ Kvindek Jaroj), R. O., n-ro 3, 1941.

La ceteraj estas japanlingvaj artikoletoj verkitaj aŭ de li mem aŭ de aliaj. Ili pli-malpli utilis por koni la personecon de la doktoro, sed la plej riĉan materialon liveras la ĵus eldonita ampleksa verko japanlingva de Hisaharu Tukuba : Kolekto da Verkoj de Asajiro Oka, en kiu la editoro donas detalajn komentariojn pri la agadoj, pensoj kaj persono de la doktoro.

Doktoro Asajiro Oka, mondfama zoologo, honora profesoro de la iama Tokia Alta Pedagogia Lernejo (nun Literatur-Scienca Universitato de Tokio) kaj granda meritulo en la enkonduko de la Evoluismo en Japanion, estis naskita, 1868, proksime de la nuna urbeto Ryūyōtyō de Prefektujo Sizuoka, kiel la dua filo de Hideoki Oka, kiu baldaŭ estis la responda oficisto ĉe la ŝtata monfarejo en Oosaka.

Ĉirkaŭ 6-jara, li jam lernis de la patro la anglan alfabeton, kaj ĉ. 12-jara eniris en la Anglalingvan Lernejon de Oosaka. En tiu lernejo la instruistoj estis plejparte eŭropanoj, kaj ili instruis algebron, geometrion, geografion, historion ktp, nome ĉion en la angla lingvo. La germanan li eklernis ĉ. 16-jara, kaj du jarojn poste la francan. Li lernis ankaŭ la latinan en la dua klaso de sia universitata vivo, kaj poste ankaŭ la italan. Tiammaniere la lingva lernado fariĝis al li amata okupo.

Fininte la kursojn de la iama Imperia Universitato de Tokio, li vizitis en 1891 Germanion por studi tie sub Prof. A. Weisman en la Universitato de Freiburg. En 1892, li transiris al Lepsika Universitato por tie studi sub Prof. Karl Leuckart. Li revenis hejmen en 1894 ; en 1895 li estis nomumita profesoro ĉe la Alta Lernejo de Yamaguti, en 1897 profesoro ĉe la Tokia Alta Pedagogia Lernejo, kaj en 1925 estis elektita membro de la Japana Imperia Akademio.

Elstarajn laborojn li faris en la kadro de morfologia studo kaj klasifado de hirudoj, ascidioj, dolĉakvaj meduzoj ktp. Abundaj verkoj kaj studartiko-

loj en la lingvoj japana kaj eŭropaj. Sed apartan mencion meritas el inter liaj japanlingvaj verkoj “Lecionoj pri la Evoluismo”, unua eldono en 1904, kaj “De Grupo da Simioj al Respubliko”, unua eldono en 1926. Verkita en frua kaj facila stilo, la unua estis multe legita kaj eminente kontribuis al la ĝenerala altigo de la scienca nivelo de la popolo, eĉ laŭdita kiel la modelo de belega stilo, kaj en la dua oni vidas kian progreseman ideon havis la aŭtoro. Ne miru do, ke ambaŭ libroj ĝuis plurajn eldonojn.

Ĉ. 1885, li lernis Volapük, sed lia malkontento pri ĝi instigis lin mem krei lingvon internacian, kaj estante universitata studento, li dum 1889–1890 ellaboris planlingvon, kiun li nomis Zilengo aŭ Nia Lingvo. Esp-on li hazarde ekkonis en aprilo de 1891, en Freiburg, germana urbeto, kie li studis. La lingva supereco de Esp-o lin forte ravis. Sed tri punktoj en ĝi ne kontentigis lin, sekve li ne povis tuj adeptiĝi al Esp-o.

En unu el siaj gazetartikoloj japane verkitaj, kiun li titolis “Rememoroj” kaj publikigis en R. O., n-ro 6, 1936, li skribas :

Ĉar mi jam de kelkaj jaroj lernis Volapük, mem kreis internacian lingvon Zilengo, mi tuj aĉetis ĝin (= Die Weltsprache “Esperanto”) kaj ellegis ĝin dum tiu tago. Sed mi ne povis fariĝi pura esperantisto ; mi aliĝis ankaŭ al Idiom Neutral, kaj al Ido, kiam ili aperis. Tiamaniere pasis 15 jaroj, kaj mi aliĝis al Japana Esperanto-Asocio tuj ĉe ĝia fondiĝo en 1906. De poste mi partoprenis en preskaŭ ĉiuj ĝiaj kunsidoj. Mi memoras ankoraŭ nun tre klare, ke mi diris ĉe iu kunsido ion jenan :

“Mi eklernis Esp-on antaŭ tre longa tempo. Sed ĉar Esp-o havas kelkajn punktojn, kiuj min ne kontentigas, mi ne povis tuj fariĝi pura esperantisto, sed restis nur duona. De nun mi tamen forgesu tiujn punktojn por esti pura esperantisto.”

Fakte mi agis tiel. Al ĉiuj eksterlandaj leteroj skribitaj al mi en Ido aŭ alia lingvo internacia, mi persiste respondadis nur en Esp-o. Rezulte de tio, mi iam ricevis de rusa idisto jenan ironian leteron : “Ni aŭdis, ke la japanoj estas progresema popolo. Sed la fakto, ke vi estas bigota esperantisto, igas min kredi, ke vi estas popolo sufiĉe konservativa.”

Mi estis tre maldiligenta en la praktika propaganda movado. Escepte kelkajn malgravajn prelegojn, mi memoras nenion speciale menciindan, kiun mi faris por la bono de Esp-o. Kaj malgraŭ ke mi uzadis Esp-on por miaj privataj aferoj, mi ne fruktuzis ĝin por mia scienca agado. Nome mi skribis en Esp-o nur notkajerojn kaj taglibrojn, sed neniam ĝin uzis por miaj sciencaj verkoj aŭ gazetartikoloj.

La kelkaj punktoj, kiuj en Esp-o ne kontentigis min, verŝajne nestis firme en angulo de mia koro, obsedis min tiel forte, ke ili ĝislaste ne faris el mi fervoran esperantiston. Tion aludas ankaŭ la fakto, ke mi, en miaj privataj skribaĵoj, ĉiam arbitre skribadis *parva, infra, sinistra* ktp

anstataŭ “malgranda”, “malsupra”, “maldekstra” ktp.

D-ro A. Oka havis kvin filojn kaj unu filinon. La unuaj du filoj mortis tro junaj, sed ĉiujn aliajn li edukis eminentaj esperantistoj. La partoprenintoj de la 50-a Universala Kongreso de Esperanto en Tokio, 1965, sendube memoros D-ron Hidemiti Oka, la Rektoro de la Somera Universitato, kaj tre spritan preleginton, D-ro Naomiti Oka samokaze. Hidemiti estas la tria filo de D-ro A. Oka, kaj Naomiti la tria. Tiu estas honora profesoro kaj ĉi tiu nun profesoro, ambaŭ de la Tokia Eduka Universitato.

Nun ni rigardu kia estas la lingvo zilengo.

La Alfabeto. Ĝi konsistas el 22 literoj: a b c d e f g h i j k l m n o p r s t u v z. Mankas literoj supersignitaj.

La Prononco. Ĉiuj literoj estas tiel same prononcataj kiel en Esp-o, escepte c, kiu havas la sonon de la esperanta ĉ. Zilengo ne havas la esperantan sonon de c, kiun, se necese, oni skribas per *ts*. Ŝ kaj ĝ estas skribataj per *sj*, kaj *zj*, respektive. La sonojn ĵ kaj ĥ, oni ne diferencigas en Zilengo, ĉar, laŭ D-ro A. Oka, ili estas, kvankam malsamaj sonoj en iuj lingvoj, ofte konfuzaj de lingvo al lingvo de Eŭropo. La sono ĥ estas, laŭ li, nek internacia nek sekve necesa.

La Akcento. Ĝi kuŝas sur la vokalo antaŭ la lasta konsonanto: hómo, pátro; juvén, vivás, venír; opínio, Germánio.

NOTO — Nenia priskribo pri tio, ĉu duopaj vokaloj estas prononcataj ĉiu aparte aŭ diftonge. Laŭ la strikta regulo de la zilenga prononcado, la vortoj kiel *kauza* kaj *suivend*, devus esti 3-silabaj: ka-ú-za kaj su-iv-énd, sed oni ne scias, ĉu *europal* estas e-u-rop-al aŭ eu-rop-al. Ŝajnas, ke diftongo ekzistas almenaŭ ĉe la ‘vokaldupo sen akcento’, do *europal*, *suivend*, *opinio* ktp estus prononcataj kiel eu-rop-ál, *suiv-énd*, o-pí-nio ktp.

La Artikolo. Ekzistas nur difina artikolo *il*. Ĝi estas tamen konsiderebla pli kiel demonstrativa adjektivo, ol kiel artikolo. Oni do povas preskaŭ diri, ke Zilengo ne havas artikolon.

La Deklinacio. La substantivo kaj la pronomo finiĝas per a e i o u, kaj estas deklinaciataj nur laŭ la kazoj, sen influo de genro kaj nombro.

— a	Nominativo
— i	Genitivo
— e	Dativo
— o	Akuzativo
— u	Vokativo

-o estas la finaĵo de akuzativo, sed ĝi servas ankaŭ kiel tiuj por prepozitivo, translativo kaj absoluta kazo. Ekz-e “la mondlingvo de d-ro Oka” estas *Zilengo*, “hundo” estas *kano*, “ĉevalo” *kavallo* kaj “homo” *homo*. Sed ili estas *Zilenga*, *kana*, *kavala*, kaj *homa*, kiam ili staras kiel la subjekto de

propozicio.

Dativo estas uzata ankaŭ kiel instrumentalo por indiki aganton, simile al tiu en la japana.

Vokativo estas apenaŭ necesa.

La Pronomoj.

	Persona Pronomo			Relativa Pronomo	Demanda Pronomo Persona
	1-a persono.	2-a persono.	3-a persono.		
Nominativo	za	va	la	ka	kia
Genitivo	zi	vi	li	ki	kii
Dativo	ze	ve	le	ke	kie
Akuzativo	zo	vo	lo	ko	kio

La Nombro. La gramatika nombro tute ne ekzistas en Zilengo same kiel en la lingvoj aina, ĉina, japana, korea, tibeta, ktp, ĉar la pluraleco estas indikata tute bone per la numeralo: *kink* homo = kvin homoj, *dek* libro = dek libroj. En okazo de nepra neceso por indiki aŭ singularecon aŭ plura-recon, sufiĉas aldoni unu el la adjektivoj aŭ *sol* aŭ *unik* post nominativa personalo, aŭ la substantivon *socio* post la personalo genitiva: *za sol has alid opinio* = nur mi havis alian opinion; *zi socio vas hir pekuno* = ni volis havi monon.

Ĉar gramatika nombro ne ekzistas, *la* servas komune por *li*, *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*. Sekve: *Is la pianista?* = ĉu li (aŭ ŝi, aŭ ili) estas pianist(in)o(j)?

La Adjektiv-pronomoj Demonstrativa, Negativa kaj Demanda.

<i>sil</i>	ĉi tiu(n)	<i>silo</i>	ĉi tio
<i>til</i>	tiu(n)	<i>tilo</i>	tio
<i>nil</i>	neniu(n)	<i>nilo</i>	nenio
<i>kil</i>	kiu(n)	<i>kilo</i>	kio

La Adjektivo. Ĝi finiĝas per *d*, *f*, *k*, *l*, kiel skribas tion D-ro Oka mem en "Skizo de la lingvo internacia Zilengo"; sed S. Aihara raportas, ke ĝi finiĝas per *d*, *k*, *l* (vidu supre!). Probable la *f* enŝoviĝis misprese aŭ misskribe, ĉar tute mankas ekzemplo. Ekz-e: *grand* (granda), *praktik* (praktika), *senil* (maljuna).

Komparativo. Ĝi finiĝas per *-or*: *simplor* (pli simpla), *gravor* (pli grava).

Superlativo. Ĝi finiĝas per *-im*: *simplim* (plej simpla), *gravim* (plej grava).

La Adverbo. Ĝi finiĝas per *m, n, p*, laŭ la "Skizo" kaj Aihara. Sed fakto montras, ke ankaŭ aliaj konsonantoj estas uzataj kiel la finaĵoj de la adverbo; iam eĉ vokalo servas kiel tia. Ekz-e, *rapidem* (rapide), *herin* (hieraŭ), *trop* (tro); *mult* (tre), *plus* (cetere); *anke* (ankaŭ).

"En la unua tempo de la kreo de Zilengo, diris D-ro A. Oka, la adjektivo kaj la adverbo estas strikte diferencigitaj unu de la alia per la finaĵoj, sed mi nun opinias, ke tia diferencigo ne estas necesa." Jen kial troviĝas adjektivoj kiel: *long* (longa), *silent* (silenta), *ekstrem* (ekstrema), *ordinar* (ordinara), *rigoruz* (rigora), *ceter* (cetera) ktp, kiuj estas tute bone konsidereblaj tiel adjektivaj kiel adverbaj.

La Numeralo. La fundamentaj numeraloj donitaj de D-ro Oka en la ekzemplaj frazoj ne estas kompletaj. Mankas tiuj por kvar, ok kaj naŭ. La ceteraj estas: un(1), du(2), tri(3); kink(5), sis(6), set(7); dek(10) kaj cent(100).

La vicmontra numeralo estas havebla per la aldono de la sufikso *-um* al la fundamenta formo: *unum* (unua), *trium* (tria) ktp.

La Verbo. Ĝi finiĝas per *r, s, t*. La Infinitivo finiĝas per *-r*, la Indikativo per *-s* kaj la Kondicionalo per *-t*. Tempaj infiksoj estas metataj antaŭ la finaĵo: *-i-* por la Prezenco, *-a-* por la Preterito kaj *-o-* por la Futuro. Ekz-e: *savir* (scii), *legir* (legi); *savas* (sciis), *legas* (legis); *savis* (scias), *legis* (legas); *savos* (scios), *legos* (legos); *savat* (estus sciinta), *legat* (estus leginta), *savit* (estus scianta = scius), *legit* (estus leganta = legus), *savot* (estus scionta), *legot* (estus legonta).

La Participo Aktiva finiĝas per *end*, kaj la Participo Pasiva per *ed*.

Oni povas diri aŭ *amisur* aŭ *is amed* por "estas amata".

La plej ofte uzataj verboj estas: *ir* (esti), *hir* (havi), *dir* (devi), *pir* (povi) kaj *vir* (voli).

Por negacio, oni metas *ne* antaŭ la verbo.

La Vortordo. La vortordo estas ĝenerale tia sama, kiel en ĉefaj eŭropaj lingvoj: subjekto, predikato, objekto aŭ adjekto. Sed ĉar la kazoj estas strikte diferencigataj morfologie, la vortordo estas ne nepre fiksinda, sed libera laŭ la postulo de eŭfonio aŭ emfazo de vortsignifo. Mallonga vorto kiel personalo kutime prenas lokon ankaŭ la verbo: *za ve donis libro* (mi al vi donas libron).

En demanda propozicio sen demanda pronomo, la verbo venas antaŭ la subjekton: *has vi patra bel floro?* (ĉu via patro havis belan floron?).

NOTO. — Tiu ĉi metodo estas tamen iafoje ambigua, ĉar la verbo staras ĉe la frazkomenco ankaŭ en senpersona propozicio. Vidu poste en Ante Kinkdek Ano.

La demanda pronomo staras en la komenco de la propozicio: *kia ve donas sil libro?* (kiu al vi donis tiun ĉi libron?)

Nun mi sentuŝe citos kion D-ro Asajiro Oka verkis en sia lingvo kaj mem esperantigis por aperigi en La Revuo Orienta, marto, 1941.

Ante Kinkdek Ano

1. *Tam, za as juven studento.*
2. *Savis va, kant ano za has?*
3. *Za has dudekdu ano e kelk meso.*

Antaŭ kvindek jaroj

- Tiam mi estis juna studento.
- Ĉu vi scias, kiom da jaroj mi havis?
- Mi davis dudek du jarojn kaj kelkajn monatojn.
- E za vivas in Freiburg, parv urbo in ocidental Germanio.* Kaj mi vivis en Freiburg, malgranda urbo en okcidenta Germanujo.
- Un dio, za alas a libraro, komperir svedik dicionaro.* Unu tagon mi iris al librovendejo por aĉeti svedan vortaron.
- Sur tabulo, u lokasur manuala lengal, za trovas parv libreto kon titolo.* "Die Weltsprache Esperanto". Sur la breto, kie estas lokitaj lingvaj lernolibroj, mi trovis unu malgrandan libreton kun la titolo "Die Weltsprache Esperanto".
- Za lo koperas sin hezito, e in mesm dio, za legas tut libreto.* Mi tuj aĉetis ĝin, kaj en la sama tago, mi tralegis la tutan libreton.
- Kar, va demandos, za as tel avid?* Kial, vi demandos, mi estis tiel avida?
- Il kauza is, kod za mem anke inventas, du ano anteor, un lengo internacial, ko za nomas "Zilengo", e zi kapita as ancor kald de lo.* La kaŭzo estas, ke mi mem ankaŭ elpensis du jarojn pli frue unu lingvon internacian, kiun mi nomis "Zilengo", kaj mia kapo estis ankoraŭ varmega de ĝi.
- An za venas savir Esperanto, za as aprenend rusik lengo.* Kiam mi konatiĝis kun Esperanto, mi estis lernanta la rusan lingvon.
- Zi docenta as rusero, nomed Zalkind, studento de medicino.* Mia instruisto estis ruso, nomita Zalkind, studento de medicino.
- Rusik is sisum stran lengo, ko za aprenas.* La rusa estas la sesa fremda lingvo, kiun mi lernis.
- Il kink ceter lenga, in ordo de zi apreno, is suivend: anglisk, germanisk, fransisk, latinisk e italisk.* La aliaj kvin lingvoj, laŭ ordo de mia eklerno, estas jenaj: angla, germana, franca, latina kaj itala.
- Zi docenta de italisk lengo as italero, nomed Benda, profesoro de lengo.* Mia intruisto de la itala lingvo estis italo nomita Benda, profesoro de lingvoj.
- Is in sil epoko, kod za inventas Zilengo.* Estas en tiu epoko, ke mi elpensis Zilengon.

NOTO. Jen ekzemplo de senpersona konstruo, kiu riskas esti komprenata aŭ kiel jesa aŭ kiel demanda.

16. *Za elektas radiko de parolo da latinik, italik e fransik.* Mi elektis vortradikojn el la latina, itala kaj franca.
17. *Tost post komenso de studo de rusik lengo, za komensas, per memdoco, simultan apreno de set lengo europal modern, nomen: espanik, portugalik, holandik, svedik, norgig, polik e bohemik.* Baldaŭ post la eklerno de la rusa lingvo, mi komencis per meminstruo samtempan lernadon de sep modernaj eŭropaj lingvoj, nome: hispana, portugala, holanda, sveda, norvega, pola kaj bohema.
18. *Is in sil stado de zi studo lengal, kod za hazard venas savir Esperanto.* Estas en tiu ĉi stadio de mia lingva studado, ke mi hazarde eksciis Esperanton.
19. *Alis sin dikir, kod za komparas nov aprened lengo kon Zilengo, e lo ekzamenas de zi punkto de vido.* Komprenoble mi komparis la nove lernitan lingvon kun Zilengo, kaj ekzamenis ĝin de mia vidpunkto. Noto. "Alis sin dikir" estas laŭvorte; iras sen diri.
20. *De komenso, za trovas tri punkto, ka ne zo satifas.* De komenco mi trovis tri punktojn, kiuj ne kontentigis min.
21. *Unum — lezerim — konsernis supersigno.* La unua, la plej malgrava, koncernis la supersignon.
22. *Simplor, bonor. Ne ver? Ju pli simple, des pli bone. Ĉu ne?*
23. *Si tel sona kom kja, nja, bjo, mjo, pju, rju, pis prezentisur kon ordinar letro, sin asisto de supersigno, kar ne anke sona ŝa e ja? Se oni povas prezenti tiajn sonojn kiel kja, nja, bjo, mjo, pju, rju, per ordinaraj literoj sen la helpo de la supersigno, kial ne ankaŭ la sonojn ŝa kaj ja?*
24. *Ĥ... O ve! Ĥ... Ho ve!*
25. *Duum punkta — gravor — is abuzo de prefikso "mal".* La dua punkto, pli grava, estas la trouzo de la prefikso *mal*.
26. *Za konsentis, kod, in cert kaso, uza de til paroleto is mult komod.* Mi konsentas, ke, en certaj okazoj, la uzo de tiu vorteto estas tre konvena.
27. *Ma, kon parolo, ka uzisur cent volt cask dio, ekzemplem bona, granda, ami, fermi, supre, frue e ceter, e c., it kelk difisil zo konvertir.* Sed ĉe la vortoj, kiujn oni uzas cent fojojn ĉiutage, ekz-e bona, granda, ami fermi, supre, frue ktp estus iom malfacile konverti min.
28. *Plus, in til relato, autora mem ne as konsekval.* Cetere, en tiu rilato la aŭtoro mem ne estis konsekvenca.
29. *La preferas parolo orienta, norda, antaŭ, fini, a malokcidenta, malsuda, malpost, malkomenci.* Li preferis la vortojn *orienta, norda, antaŭ, fini* ol *malokcidenta, malsuda, malpost, malkomenci*.
30. *Konsernend du punkto super doned, idisto semblas hir mesm opinio kom zo.* Koncerne la du punktojn supre menciitajn la idistoj ŝajnas havi la saman opinion kiel mi.

31. *De lo suivis, kod Zilengo similis Ido, multor a Esperanto.* De tio sekvas, ke Zilengo similas Idon, pli ol Esperanton.
32. *Pasend, za vis anoncir, kod idista adoptas mesm tri parolo — italik — ko za uzas, long anteor, in Zilengo : e (kaj), ma (sed), o (aŭ).* Pasante, mi volas anonci, ke la idistoj adoptis la samajn tri vortojn, italajn, kiujn mi uzis, longe antaŭe, en Zilengo : e (kaj), ma (sed), o (aŭ).
33. *Trium punkta — gravim — is ekzisto de numero gramatikal.* La tria punkto, la plej grava, estas la ekzisto de la gramatika nombro.
34. *Zamenhof rezjetas sekso gramatikal, grandim absurdito de lengo europal, ma konservas numero gramatikal.* Zamenhof forjetis la gramatikan sekson, la plej grandan absurdaĵon de eŭropaj lingvoj, sed li konservis la gramatikan nombron.
35. *Probabil, la vel ne somnas de rezjeto de tilo.* Verŝajne li eĉ ne songis pri ĝia forjeto.
36. *Lengo japonik ne his numero gramatikal.* La japana lingvo ne havas la gramatikan nombron.
37. *Tar, japonera vel ne somnis de lo, zis la aprenis alk lengo europal.* Tial la japano eĉ ne songis pri ĝi, ĝis li eklernas iun eŭropan lingvon.
38. *Praktik anglera, ka jam rezjetas sekso gramatikal, anke rezjetas numero gramatikal in adjektivo.* La praktika anglo, kiu jam forjetis la gramatikan sekson, forjetis ankaŭ la gramatikan nombron ĉe la adjektivo.
39. *La ne dikis “blacks dogs” o “preties girls”.* Li ne diras “blacks dogs” aŭ “preties girls”.
40. *Is regretir, kod kreenta de Esperanto ne posedas savo de lengo de Ekstrem Oriento.* Estas bedaŭrinde, ke la kreinto de Esperanto ne posedis konon de la lingvoj de Ekstrema Oriento.
41. *Skurzer zo, si za dikas ka ne vo plezis.* Senkulpigu min, se mi diras ion, kio ne plaĉas al vi.
42. *Dikir vero, il tri punkta su enumerated zo detenas, dum long tempo, de divenir esperantisto.* Verdire, la tie ĉi menciitaj tri punktoj detenis min, dum longa tempo, de fariĝi esperantisto.
43. *Postem, cirkonstansa zo konvinkas, kod sil munda is plen de sinjoro, ki judika de lengo mundal is mult minor rigoruz a zio.* Poste, la cirkonstancoj konvinkis min, ke tiu ĉi mondo estas plena de sinjoroj, kies juĝo de la mondlingvoj estas multe malpli rigora ol la mia.
44. *E za decidas agresir a li grupo.* Kaj mi decidis aliĝi al ilia grupo.
45. *Ko za, de juvenito, fervorem deziras hir, is un sol lengo internacial, ka pis servir, — ne mul.* Tio, kion mi, de mia juneco fervore deziris havi, estas unu sola lingvo internacia kiu taŭgas, — ne multaj.

NOTO. La originalo donas *mul*, sed restas dubo, ke ĝi devus esti *mult*, en efektiveco. Vidu supre “mult komod” en la ekzempla frazo 26.

46. *Kod Esperanto pis servir, atestis tutan agrandend numera de li uzento e li tutan kreskend literatura.* Ke Esperanto taugas, tion atestas la ĉiam pligradiĝanta nombro de ĝiaj uzantoj kaj ĝia ĉiam kreskanta literaturo.
47. *San, za is senil ermito, e silent regardis, kon plezo, progreso de ago pro lengo mundal.* Nun, mi estas maljuna ermito, kaj silente rigardas, kun ĝojo, la progreson de la movado por la mondlingvo.
48. *Dormer bon! Dormu bone!*

NOTO. Jen cito el la lasta parto de "Skizo de la lingvo internacia 'Zilengo'": Kiam mi provis unue, antaŭ kvardek-sep jaroj, konstrui la novan internacian lingvon kiun mi nomis "Zilengo", t. e. nia lingvo, mi pripensis detale pri la maloportuneco, kiu eble okazos, se oni forĵetis la gramatikan nombron de substantivo, kiu ja ne troviĝas en la japana lingvo. Al mi ŝajnis ke la neekzisto de la gramatika nombro neniel malhelpas la uzadon de la lingvo, sed kontraŭe simpligas enorme la gramatikon. Kial diri "unu homo", "du homoj"? La vortoj unu kaj du montras sufiĉe la nombron de la homoj. Okaze oni devas diri "homo aŭ homoj", ĉar oni ne scias kiom da homoj tie troviĝas. Ĝis nun neniu el la multnombraj elpensintoj de internaciaj lingvoj songis pri la forĵeto de la gramatika nombro de substantivo, simple ĉar ili estis senescepte eŭropanoj. Ili memorigas min pri la fiŝvendistoj, kiuj ne sentas la odoron de fiŝoj, ĉar ili neniam vivadis en senodora mondo.

La vortradikoj estis prenitaj plej eble de la latino.

Trafa rezonado admirinda! Laŭ K. Ossaka, *Latino sine Flexione* de Prof. Peano, 1903 (poste renomita *Linterlingua*, en 1908) estas probable la sola planlingvo sen pluralo, kreita de eŭropano. Sed ties anoj baldaŭ komencis enkonduki la finaĵon -s por indiki pluralecon. Tion pravigas Peano, dirante, ke tio ĉi ne estas gramatika regulo, sed simple kutimo sekvanta tiun en multaj eŭropaj lingvoj. Ruza pravigo!

Efektive Esp-o estas tre rigora observi la pluralecon. En ĝi oni devas diri: *kiu venis?* kaj *kiuj venis?*, dum la angla, franca, germana ktp uzas komunan formon de demanda vorto tiel por ununombro kiel por multenombro, kaj ŝanĝas laŭ nombro la verbon, malsame ol en Esp-o. Sed kial? Nenia klarigo donebla!

Ke la nombro ne estas tiel logike observata, montras faktoj: germano diras *Wörterbuch*, sed ne *Wortbuch*, kaj *Zahnbürste*, sed ne *Zähnebürste*. "Unu jaro havas kvar sezonojn" estas jene esprimata, respektive, en la estona kaj la hungara, ambaŭ lingvoj kun la gramatika nombro: *aastas on neli aastaaega* kaj *évbén négy évszak van*, kie *neli aastaaega* kaj *négy évszak* estas ne "kvar sezonoj" sed "kvar sezono" (ambaŭ frazoj laŭvorte signifas: en unu jaro estas kvar sezonoj).

Laste mi menciu kion eĉ la konsciencia editoro Tukuba tute preteraten-

tis. Nome, ke D-ro A. Oka estis tre fervora ankaŭ en la movado de latinigo de la japana skribsistemo, kaj apartenis al Nippon Rōmazi-kai (Japana Asocio de Latinigado). Kiel freŝe mi memoras, ke iam li al mi diris, aŭ skribis en sia letero aŭ karto ion jenan: Permesu al mi, ke mi skribu mian nomon Asajiro Oka, malgraŭ ke nia skribsistemo laŭ la latina alfabeto unuflanke ekskludas la literon j, kaj aliflanke uzas ô por la longa o. Ĉar mi jam delonge alkutimiĝis al la uzo de Asajiro en miaj publikigitaj paperoj, do se mi subite ekuzus Asazirô Oka, strikte laŭ la regulo, oni povus preni min por alia homo.

Literaturo

En Esperanto:

1. E. Drezen: Historio de la Mondolingvo, 1931.
2. "Enciklopedio de Esperanto", 1933-4.
3. "Ora Libro de Esperanto", 1937.
4. D-ro Oka: Skizo de la lingvo internacia "Zilengo", R. O., 12, 1936.

En Zilengo kaj Esperanto:

1. Ante Kinkdek Ano (Antaŭ Kvindek Jaroj), R. O., 3, 1941.

En la japana lingvo:

1. Takagi-H.: "Sekaigo no Rekisi" (traduko de la "Mondolingvo" de E. Drezen), 1934.
2. D-ro A. Oka: Omoide (Rememoroj), R. O., 6, 1936.
3. Susumu Aihara: Oka Asajiro Hakusi to Simose Kentarô Si (D-ro A. Oka kaj s-ro Kentarô Simose), R. O., 8, 1936.
4. Redakcia intervjuo farita okaze de la 50-a datreveno de la apero de Zilengo, R. O., 4, 1940.
5. D-ro A. Oka: Syumi no Gogaku (Lingva lernado — mia amata okupo), R. O., 5, 1964.
6. K. Ossaka: Zilengo no deklinacio (La deklinacio de Zilengo), R. O., 7, 1964.
7. Hisaharu Tukuba: "Oka Asajiro Syû", 1974.

Korekto

En "Tankaĵoj de Onisaburo", kiu aperis en la antaŭa numero, bonvolu legi, sur p. 19:

*same je l' Di-epoko,
staras plu belaspekta!
(anstataŭ samaspekta!)*

Invito al la 5a IRKE

Komitato de la Interreligia Kunveno Esperantista (IRKE). Komisiito por 1975 : Josef Eder, UEA-del. A-8020 Graz, Eggenberger Gürtel 32, Aŭstrio

Estimataj komitatanoj kaj geamikoj!

Baldaŭ estos pasinta 1 jaro post la 6a IRKE en Hamburgo, en kiu ni atingis gravan interkonsenton principan: ke fakte ekzistas postmorta vivo, t. e. eterna vivo post la fizika morto. Ke multe diferencas la opinioj pri la demandoj, kie kaj kia ĝi estas, ne gravas, ĉar ĉiu el ni ja mem travivos ĝin. La ĉefa afero estas, ke ni tute sincere serĉu la veron kaj amu ĝin.

La konstanta sekretario de nia komitato, amiko Yoŝimi Umeda de la Oomoto-movado, petis min perletere, ke mi same kiel jam 3-foje tiel ankaŭ ĉi-jare preparu kaj prezidu la IRKE en la kadro de la 60a UK en Kopenhago. Umeda ne havas tempon pro konstantaj ekspozicioj pri japanaj arto kaj kulturo en diversaj landoj, nun en Usono. Malgraŭ gravaj malfacilaĵoj mi tamen akceptis tiun peton kaj jam ekagis.

Nun mi turnas min al vi kun la *afabla invito* partopreni la 7an IRKE

kaj kunlabori laŭkapable en jena maniero :

1. Bonvolu informi min baldaŭ pri via certa (aŭ eventuala) partopreno.

2. Bonvolu ĉiuokaze pretigi referaĵon por via religia movado (maks. 3-minutan) pri la ĉi-jara temo proponita en la pasinta jaro: "LA VERA RELIGIA EKUMENO". Kiumaniere ni atingu la veran ekumenon ne nur por la surtera vivo, sed por la eterna vivo? — Jen la kulmino de niaj ĝisnunaj klopodoj.

3. Tiun skribitan referaĵon bv. post via laŭtleĝo transdoni al la prezidanto. Se vi ne pertoprenos, bv. sendi la manuskripton ĝis plej malfrue la 15a julio al mi persone, por ke iu alia laŭtleĝu ĝin. Post la 15a julio sendu ĝin al la 60a UK en Kopenhago, por la 7a Interreligia Kunveno Esperantista. Tie mi transprenos ĝin.

4. Faru proponon pri temo resp. aranĝo pri senceremonia diservo por la sekvanta IRKE! Eventuale pri libera interparolo, por kiu ĝis nun mankis la necesa tempo.

5. Bv. kontribui iom laŭ via kapablo por la preparo kaj poŝtafran-

Ginekologiaj (virinaj) malsanoj (2)

Metrito (uterito) estas inflamo de la utero manifestiganta per lokaj, apudaj kaj refleksaj simptomoj. La ĉefaj lokaj simptomoj estas: 1) doloro, kiu kelkfoje intensiĝas kva-zaŭ koliko, kaj propagiĝas al lumboj, femuroj, k. t. p.; 2) leŭkoreo (elfluo); 3) hemoragioj pli-malpli abundaj. Ĝenerale la menstruo iĝas neregula. La apudaj simptomoj estas urinvezikaj (ofta, urĝa kaj ŝajna bezono de urinado, doloro), rektumaj (doloro, mallakso), ovariaj (doloroj kelkfoje tre akraj). La refleksaj simptomoj estas digestaj (naŭzoj, vomoj, stomaka doloro, mallakso, gasa disstreĉo de la intesto, hepataj perturboj); cirkulaj (palpitacio, takikardio, ekstrasistolo, doloro aŭ angoro en la antaŭkora regiono, nedaŭra hipertensio); spiraj (seka tusado, spasma korizo); nervaj (neŭrastenio, hipokondrio, neŭralgioj, vertiĝo), k. t. p.

Tiel iompostiome plimalboniĝas la ĝenerala sanstato de la paciento, kiu magriĝas, malfortiĝas, kaj prezentas tipan vizaĝaspekton: la

haŭto iom flaveta kaj bluringaj okuloj.

Jen la kuracado:

Dum la akuta fazo, enlitigu. Ĉiutage faru 2 vaginajn enŝprucigojn per 1 litro da dekoktoj aŭ solvaĵoj indikitaj en "Cervikito". Vegetara dieto, prefere fruktoj kaj krudaj salatoj. Trinku infuzojn de trankviligaj plantoj (tili- kaj oranĝofloroj, pasifloro). Ĉiu 3-hore apliku klisteron de taso da malvarma salakvo (solvu 1 kafkuleretplendon da salo en 1 litro da akvo, kaj vi havos por 5 klisteroj). Se la doloroj estas akraj, anstataŭigu la salakvon per dekokto de papavo aŭ papaveto. Apliku sur la malsupran parton de la ventro malvarman kompreson, kaj renovigu ĝin ĉiu 10, 15 aŭ 20-minute, laŭbezone, dum la tago. Nokte apliku alian kompreson, kaj demetu ĝin la sekvantan matenon; aŭ preferinde kataplasmon el malvarma argilo.

Dum la kronika fazo estas indikindaj: sunbanoj, vaporbanoj al la malsupra duono de la korpo, frotado

ta de Oomoto.

Salutas kaj bondeziras vin sincere via samcelano kaj amiko

Josef Eder

koj al mi per resp.-kuponoj, ĉar post mi ne staras organizaĵo, kiu pagas miajn elspezojn por tiu celo! (Aŭ per persona pago dum la IRKE.)

La salono estas mendita kaj pagi-

de la malsupra parto de la ventro per malvarma akvo, vaginaj enŝprucigoj per 1 litro da dekokto de ekvizeto aŭ folioj de juglandujo, dia-termio.

Benignaj uteraj tumoroj. — Temas plejofte pri muskolaj kaj fibraj tumoroj, kiuj trafas precipe virinojn 35~40-jarajn. Ili nomiĝas benignaj, ĉar ili ne ĝeneraligās kaj estas malrapidevoluaj. Tamen ili ofte havas gravan prognozon pro la hemoragioj kaj komplikajoj, kiuj prezentiĝas dum ties evoluado.

Endokrinaj (precipe ovariaj) perturboj ludas tiu ĉi kaze gravan rolon en la apero de kompleta malreguleco de la menstruoj, kiuj povas prezentiĝi du aŭ trifoje ĉiumonate. Eĉ ofte okazas, ke la sangelfluo iĝas abunda kaj kontinua, kio grave anemias la virinon.

Krome aperas hidroreo, tio estas abunda kaj klara serozaja elfluo; doloroj, ĉefe pro kunpremo de nervoj; kaj aliaj simptomoj kaŭzataj de la tumoroj, kiu kunpremas la urinciston (malfacileco en urinado), la inteston (mallakso), angiojn (varikoj, edemoj), k. t. p.

Jen la kuracado:

Dum la troa menstrua sangado, enlitiĝu. Apliku malvarmajn kompresojn sur la malsupran parton de la ventro, renovigante ilin ofte. Trinku tizanojn de iu sanghaltiga herbo ekzistanta en via lando (paŝtista kapselo, akileo aŭ milfolio, ekvizeto, k. t. p.) kaj/aŭ ĉiuhore aŭ ĉiuduhore kulerplenon da suko de krudaj rafanetoj (raspu ilin subtile

kaj la raspitaĵon elpremu en peco da tolaĵo). Unu fojon enstomakigu ankaŭ unu kafkulerplenon da salo solvita en duontaso da malvarma akvo (tiu solvaĵo, samkiel la suko de rafanetoj, havas sanghaltigajn ecojn). Du aŭ tri fojojn tage enŝprucigu en la vaginon 1 litron da dekokto de ekvizeto kiel eble plej varma (42°-45°C). Se ekvizeto ne estas havebla, uzu simplan varman akvon. Du aŭ triminuta ŝprucigo de malvarma akvo sur la plandojn influas reflekse la uteron kaj povas kontribui ankaŭ en la kuracado de la hemoragioj.

Ĉe la komenco, normala (kaj poste fortiga) vegetara dieto kun abundo da fruktoj kaj krudaj salatoj estas rekomendinda. Ankaŭ la frotado de la malsupra parto de la ventro per malvarma akvo ĉiumatene ĉe ellitiĝo.

Fortranĉo de la tumoroj aŭ de la utero mem povas esti necesa, kiam la hemoragioj ne ĉesas, kaj ankaŭ ĉe gravaj komplikajoj.

Uteraj delokiĝoj. — La nenormalaj devioj aŭ delokiĝoj de la utero antaŭen, malantaŭen, flanken aŭ malsupren, plejofte pro malstreĉiĝo de ĝiaj subtenaj rimedoj, povas kaŭzi, kiam ili estas grandaj, diversajn perturbojn kaj komplikajn, ĉefe dum gravedeco.

La frotado de la malsupra parto de la ventro per malvarma akvo, la alternaj kompresoj varmaj-malvarmaj sur la ventron, la masaĝoj ventra kaj ginekologia fare de kompetenta kuracisto, la kuracgimnas-

STAFETO: Beletraj Kajeroj

L. L. Zamenhof : PROVERBARO ESPERANTA. Alfabetigita kaj indeksigita de Camille Rogister. — Enkonduko kaj postparolo* de G. Waringhien. — Antaŭparoloj de Marko Fabianoviĉ kaj L. L. Zamenhof. — Kajera n-ro 10, 2a eldono, 196 pĝ. — Prezo : 190 pesetoj, 3.30 usonaj dolaroj *aŭ egalvaloro en aliaj valutoj*.

Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli : NI DEVAS VIVI. *Poemoj*. — Antaŭparolo de J. Régulo. — Kajera n-ro 45, 156 pĝ. — Prezo : 190 pesetoj, 3.30 us. dol.

Louis Beaucaire : EL LA VIVO DE BERVALA SENTAŬGULO. *Maldeceta epizodaro*. — Kajera n-ro 46, 136 pĝ. — Prezo : 190 pesetoj, 3.30 us. dol.

*Mi devas informe aldoni, ke sur la nefirman ekonomion, kiu apogas la STAFETO-eldonojn, lastatempe falis ne malmultaj suferoj, ĉiuj fremdaj al la entrepreno mem: la ĝenerala plialtigo de ĉiuj kostoj, kiu rapidigas nin al stato de ĉion manganta inflacio, estas io, kion ĉiuj konas kaj mi ne bezonas substreki. Nur du solvoj estas praktikeblaj por eliri el tiu marĉo: aŭ mortigi la entreprenon, aŭ plialtigi la vendoprezon de la libroj por iel peni kapeigi la ŝtormon. Neniu el ambaŭ solvoj plaĉas al mi; sed pro iela instinkto savi, kion mi amas, mi elektis la duan — je kio mi petas vin bonvole akcepti ĉiajn ekskuzojn el mia flanko.

*Kvindeko da libroservoj kaj libriste konstantaj mendantoj, kaj aliaj kvincent amikoj, kiuj regule aĉetas miajn librojn pere de la ordinaraĵ librovendejoj de la Movado, afable akceptu, kaj mian dankon pro ilia daŭra subtenado, kaj la prezaltigon, kiun mi devas hodiaŭ anonci. Mian dankon mi firme deklaras: vian akcepton de la novaj prezoj mi espereme atendas."

Juan Régulo, Eldonisto

.....
tiko, k. t. p. estas konsilindaj. La pesario (aparato por subteni la uteron) malofte havigas bonajn rezultojn. Sed zono aplikita sur la mezan malsupran parton de la ventro mildigas la dolorojn ĉe la utera

kliniĝo antaŭen.

Se tiuj naturaj rimedoj ne efikas, kaj la delokiĝo estas granda, la kirurgia operacio povas esti necesa.

(*daŭrigota*)

